

& Eks-promte:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Helena Melnikova (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/SoSo doododo Tido re so;so soso soso redo Ti So; SoSo doododo Tido re so; soso laafafa reTi do do;

(#Rekantaĵe:; SoSo doododo Tido re so;so soso soso redo Ti So; So dodo Tido re so; soso laafafa reTi re do o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Vi ankoraŭ esperon havas? ; Vi ĝis nun homajn vortojn kredas? ; Ho infano, vi estas sankta! ; Ve al vi, stultulaĉ' mizera!

(×:; **Do nun paŝu ni en la ĉeno ; Ĉar danci estas rava beno ; Kun mane firma teno ; Do nun paŝu ni en la ĉeno.**)

'2 Mi ne celas atendi helpon, ; Nek atendi pohoran velkon. ; Mi elektos tagon aŭ nokton, ; mi elektos tempon kaj lokon –

'3 mi forlasos la Teron memstare. ; Ne balbutu, ke pekas mi – vane: ; mi ne kredas inferon, tamen... ; Tie estus almenaŭ varme!

'4 Mia flago senforte pendas, ; mia flamo ne plu varmigas, ; miaj vitroj koloraj fendas, ; mia vento flugadi pigras.

'5 Ili diras: ĉu io gravas ; aŭ vin ne embuskas fino? ; Jes, sinjoro Kajam, vi pravas... ; Mi foriras aĉeti vinon.)